

bulteno

de Esperantistaj Kluboj Praha kaj Brno

3/1994

PERIODIKUM ESPERANTSKÝCH KLUBŮ V PRAZE A V BRNĚ

67. světový kongres esperantistů sdružených v SAT se konal ve dnech 16. až 23. července 1994 ve Strážnici. Osmidenního programu se zúčastnilo přes 300 esperantistů prakticky ze všech evropských zemí, ale také z Austrálie, Japonska a Kanady. Kongres se těšil podpoře ministerstva kultury - všichni účastníci dostali společně s dalšími kongresovými materiály výtisk esperantského překladu Čapkova románu *Válka s mloky*, vydaného za finanční pomoci ministerstva kultury právě k příležitosti kongresu.

SPT Telecom vydal ke stejné příležitosti speciální telefonní kartu pro sběratele, na níž se ve světové premiéře objevil text v esperantu. Česká pošta užívala pro doporučenou poštu speciální příležitostnou rekomandační nálepkou s esperantským textem a k orážení příležitostných zásilek byly používány speciální příležitostné štočky ve frankovacích strojcích. Vedle oficiálního programu a pracovních jednání jednotlivých komisí a frakcí SAT se uskutečnila i řada hodnotných neoficiálních setkání a kulturních akcí.

Japonská učitelka, pí Markarian, pro zájemce vedla kurz počítání na sorobánu, speciálním japonském počítadle. Pro účastníky kongresu byly připraveny koncerty, na kterých se ve folklorní části představila cimbálová muzika Strážničan s tanečními skupinami Žerotín a Lipina. V pěveckém vystoupení podal hodnotný výkon Miroslav Smyčka z Ústí n. Labem. V divadle jednoho herce účinkovala herečka Eva Seemannová z Prahy. Svě představení uvedlo Naivní divadlo z Liberce a nechybělo ani kouzelnické představení Linhartá Rýznara. Nezapomenutelné zážitky si mnozí kongresoví hosté odvezli z návštěvy vinných sklepů "Plže" v nedalekém Petrově (zdejší víno zachutnalo všem, i labužníkům z Francie a Itálie), ale také z výletů na Pálavu, Velehrad, do zámků v Miloticích a v Lednici.

V závěrečném hodnocení bylo vysloveno poděkování organizátorům za nápad zorganizovat exkurzi do závodu Šohaj ve Strážnici a debatu s odborovými funkcionáři hodonínského okresu.

Nova PIV

SAT preparas novan korektitan kaj kompletigitan reeldonon de PIV. La ŝanĝoj tuŝos jenajn aferojn:

1. Inkluzivigo de la nuna Suplemento en la tekston, novaj simboloj por ekologio kaj komputiko.
2. Korekto de malglataĵoj kaj mistajpaĵoj
3. Korekto de malkoheraĵoj (ekz. sub "albumeno" aperas vorto "perispermo", kiun vi sub P vane serĉus)
4. Korekto de neĝustaj difinoj
5. Ĝisdatigo de difinoj (ekz. pri Jugoslavio, Sovetio k.s.)
6. Enkonduko de novaj vortoj (terminoj)

Proponojn kaj rimarkigojn kolektas akademiano prof. Michel Duc Goninaz. PIV estas skane enkomputiligita, kaj nun oni kontrolas kaj korektas la skanaĵon. Se ne aperos pluraj helpantoj, la laboro daŭros ankoraŭ 12 jarojn.

Kulturo

SAT eldonis romanon de Nobel-premiito Albert Camus "La fremdulo" en traduko de Michel Duc Goninaz kaj ĈEA satiron de Karel Čapek "Milito kontraŭ Salamandroj" en traduko de Josef Vondroušek. En libroservo aperis pluraj eldonaĵoj de SAT: **Amo per proverboj** (Azevedo), **Konstrui fajron** (J. London), **Legendo pri la bela Pekopeno** (V. Hugo), **Zoologia Filozofio** (Lamark), **Jaro 2000** (H. Muller), **El la "Pensoj"** (B. Pascal), **Rakontoj** (Kafka) k.a.

BIBLIAJ RAKONTOJ
laŭ traduko de L. L. Zamenhof

Kreo de la mondo

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo.

Kaj Dio diris: "Estu lumo!" Kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo. Kaj Dio nomis la lumon Tago, kaj la mallumon Li nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago.

Kaj Dio diris: "Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo." Kaj Dio kreis la firmaĵon, kaj apartigis la akvon, kiu estas sub la firmaĵo, de la akvo, kiu estas super la firmaĵo; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio nomis la firmaĵon Ĉielo. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago.

Kaj Dio diris: "Kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj aperu la sekaĵo; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio nomis la sekaĵon Tero, kaj la kolektiĝojn de la akvo Li nomis Maroj. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona.

Kaj Dio diris: "Kreskigu la tero verdaĵon, herbon, kiu naskas semon, fruktarbon, kiu donas laŭ sia speco frukton, kies semo estas en ĝi mem, sur la tero." Kaj fariĝis tiel. Kaj la tero elkreskigis verdaĵon, herbon, kiu naskas semon laŭ sia speco, kaj arbon, kiu donas frukton, kies semo estas en ĝi mem laŭ sia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.

Kaj Dio diris: "Estu lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo, por apartigi la tagon de la nokto, kaj ili prezentu signojn, tempojn, tagojn, kaj jarojn; kaj ili estu lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo, por lumi super la tero." Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio faris la du grandajn lumaĵojn: la pli grandan lumaĵon, por regi la tagon, kaj la malpli grandan lumaĵon, por regi la nokton, kaj la stelojn. Kaj Dio starigis ilin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ili lumu sur la teron, kaj por ke ili regu la tagon kaj la nokton kaj faru diferencon inter la lumo kaj la mallumo. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.

Kaj Dio diris: "La akvo aperigu moviĝantojn, vivajn estaĵojn, kaj birdoj ekflugu super la tero, sub la ĉiela firmaĵo." Kaj Dio kreis la grandajn balenojn, kaj ĉiujn vivajn estaĵojn moviĝantajn, kiujn aperigis la akvo, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn flugilhavajn birdojn laŭ ilia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona. Kaj Dio ilin benis, dirante: "Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la akvon en la maroj, kaj la birdoj multiĝu sur la tero." Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.

Kaj Dio diris: "La tero aperigu vivajn estaĵojn, laŭ ilia speco, brutojn kaj rampaĵojn kaj surterajn bestojn, laŭ ilia speco." Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio kreis la bestojn de la tero, laŭ ilia speco, kaj la brutojn, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn rampaĵojn de la tero, laŭ ilia speco. Kaj Dio vidis, ke ĝi estas bona.

Kaj Dio diris: "Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero." Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin. Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: "Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maroj kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero." Kaj Dio diris: "Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo. Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon." Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.

Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris. Kaj Dio benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis de Sia tuta laboro, kiun Li faris kreante.

Adam kaj Eva

Tia estas la naskiĝo de la ĉielo kaj la tero, kiam ili estis kreitaj, kiam Dio la Eternulo faris la teron kaj la ĉielon. Kaj nenia kampa arbeto ankoraŭ estis sur la tero, kaj nenia kampa herbo ankoraŭ kreskis, ĉar Dio la Eternulo ne pluvigis sur la teron, kaj ne ekzistis homo, por prilabori la teron. Sed nebulo leviĝadis de la tero kaj donadis malsekecon al la tuta supraĵo de la tero.

Kaj Dio la Eternulo kreis la homon el polvo de la tero, kaj Li enblovis en lian nazon spiron de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo.

Kaj Dio la Eternulo plantis ĝardenon en Eden en la Oriento, kaj Li metis tien la homon, kiun Li kreis. Kaj Dio la Eternulo elkreskigis el la tero ĉiun arbon ĉarman por la vido kaj bonan por la manĝo kaj la arbon de vivo en la mezo de la ĝardeno, kaj la arbon de sciado pri bono kaj malbono.

Kaj rivero eliras el Eden, por akvoprovizi la ĝardenon, kaj de tie ĝi dividiĝas kaj fariĝas kvar ĉefpartoj. La nomo de unu estas Piŝon; ĝi estas tiu, kiu ĉirkaŭas la tutan landon Havila, de kie estas la oro. Kaj la oro de tiu lando estas bona; tie troviĝas bedelio kaj la ŝtono onikso. Kaj la nomo de la dua rivero estas Giĥon; ĝi estas tiu, kiu ĉirkaŭas la tutan landon Etiopujo. Kaj la nomo de la tria rivero estas Ĥidekel; ĝi estas tiu, kiu fluas antaŭ Asirio. Kaj la kvara rivero estas Eŭfrato.

Kaj Dio la Eternulo prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena, por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin. Kaj Dio la Eternulo ordonis al la homo, dirante: "De ĉiu arbo de la ĝardeno vi manĝu; sed de la arbo de sciado pri bono kaj malbono vi ne manĝu, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos."

Kaj Dio la Eternulo diris: "Ne estas bone, ke la homo estu sola; Mi kreos al li helpanton similan al li." Kaj Dio la Eternulo kreis el la tero ĉiujn bestojn de la kampo kaj ĉiujn birdojn de la ĉielo, kaj venigis ilin al la homo, por vidi, kiel li nomos ilin; kaj kiel la homo nomis ĉiun vivan estaĵon, tiel restis ĝia nomo. Kaj la homo donis nomojn al ĉiuj brutoj kaj al la birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj bestoj de la kampo; sed por la homo ne troviĝis helpanto simila al li.

Kaj Dio la Eternulo faligis profundan dormon sur la homon, kaj ĉi tiu endormiĝis; kaj Li prenis unu el liaj ripoj kaj fermis la lokon per karno. Kaj Dio la Eternulo konstruis el la ripo, kiun Li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Kaj la homo diris: "Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita. Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno."

Kaj ili ambaŭ estis nudaj, la homo kaj lia edzino, kaj ili ne hontis.

Kaj la serpento estis pli ruza, ol ĉiuj kampaj bestoj, kiujn kreis Dio la Eternulo. Kaj ĝi diris al la vinno: "Ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu de ĉiuj arboj de la ĝardeno?"

Kaj la virino diris al la serpento: "La fruktojn de la arboj de la ĝardeno ni povas manĝi; sed pri la fruktoj de la arbo, kiu estas en la mezo de la ĝardeno, Dio diris: 'Ne manĝu ion de ili kaj ne tuŝu ilin, por ke vi ne mortu.'"

Kaj la serpento diris al la virino: "Ne, vi ne mortos; sed Dio scias, ke en la tago, en kiu vi manĝos ion de ili, malfermiĝos viaj okuloj kaj vi estos kiel Dio, vi scios bonon kaj malbonon."

Kaj la virino vidis, ke la arbo estas bona por manĝi kaj ĝi estas ĉarma por la okuloj, kaj la arbo estas dezirinda por saĝiĝi; kaj ŝi prenis de ĝiaj fruktoj, kaj ŝi manĝis, kaj ŝi donis kune ankaŭ al sia edzo, kaj li manĝis. Kaj malfermiĝis la okuloj de ili ambaŭ, kaj ili sciiĝis, ke ili estas nudaj; kaj ili kunkudris foliojn de figarbo kaj faris al si zonaĵojn.

Kaj ili aŭdis la voĉon de Dio la Eternulo, kiu marŝis en la ĝardeno dum la malvarmeto de la tago; kaj Adam kaj lia edzino kaŝiĝis de Dio la Eternulo inter arboj de la ĝardeno. Kaj Dio la Eternulo vokis Adamon, kaj diris al li: "Kie vi estas?"

Kaj tiu diris: "Vian voĉon mi aŭdis en la ĝardeno, kaj mi ektimis, ĉar mi estas nuda; kaj mi kaŝis min."

Kaj Dio diris: "Kiu diris al vi, ke vi estas nuda? ĉu vi ne manĝis de la arbo, pri kiu Mi ordonis al vi, ke vi ne manĝu de ĝi?"

Kaj Adam diris: "La edzino, kiun Vi donis al mi kiel kunulinon, ŝi donis al mi de la arbo, kaj mi manĝis."

Kaj Dio la Eternulo diris al la virino:

"Kial vi tion faris?"

Kaj la virino diris: "La serpento tromplogis min, kaj mi manĝis."

Kaj Dio la Eternulo diris al la serpento: "Ĉar vi tion faris, tial estu malbenita inter ĉiuj brutoj kaj inter ĉiuj bestoj de la kampo; sur via ventro vi irados kaj teron vi manĝados dum via tuta vivo. Kaj Mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon."

Al la virino Li diris: "Mi multigos viajn suferojn dum via gravedeco; en doloro vi naskados infanojn; kaj al via viro vi vin tiros, kaj li regos super vi."

Kaj al Adam li diris: "Ĉar vi obeis la voĉon de via edzino, kaj vi manĝis de la arbo, pri kiu Mi ordonis al vi, dirante, ke vi ne manĝu de ĝi, tial malbenita estu la tero pro vi; kun suferoj vi manĝados de ĝi dum via tuta vivo. Kaj domojn kaj pikaĵojn ĝi kreskigos por vi, kaj vi manĝados herbojn de kampo. En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon, ĝis vi revenos en la teron, el kiu vi estas prenita; ĉar vi estas polvo kaj refariĝos polvo."

Kaj Adam donis al sia edzino la nomon Eva, ĉar ŝi estis patrino de ĉiuj vivantoj. Kaj Dio la Eternulo faris por Adam kaj por lia edzino vestojn el felo, kaj Li vestis ilin.

Kaj Dio la Eternulo diris: "Jen Adam fariĝis kiel unu el Ni, sciante bonon kaj malbonon; nun eble li etendos sian manon kaj prenos ankaŭ de la arbo de vivo kaj manĝos kaj vivos eteme."

Kaj Dio la Eternulo eligis lin el la Edena ĝardeno, por ke li prilaboradu la teron, el kiu li estis prenita. Kaj Li elpelis Adamon, kaj lokis antaŭ la Edena ĝardeno la kerubojn kaj la turniĝantan flaman glavon, por gardi la vojon al la arbo de vivo.

ESPERANTO PRAHA, poštovní schránka 1069, 111 21 PRAHA 1

Klub esperantistů Brno, poštovní schránka 154, 657 54 Brno

Komuna informilo de E-kluboj Praha kaj Brno. Periodický zpravodaj esperantských klubů v Praze a v Brně.

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Podávání novinových zásilek povoleno Jm. ředitelstvím spojů v Brně pod č. j. P/3 – 2982/90 ze dne 7. 3. 1990. Poštovné hrazeno u pošty Brno 2.